

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIARI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I.F.E.F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U.E.A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F.E.I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N°14 - 15

Novembro kaj Decembro 1956

COMUNICATO

Con la chiusura del VI° Convegno Nazionale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio. - I.F.E.A." tenutosi a Massa il 2 settembre 1956 nel quadro del 27° Congresso Nazionale degli Esperantisti Italiani, si è aperto il nuovo anno finanziario 1956-1957.

Sta per chiudersi anche l'anno solare. Ripetiamo gentilmente ed anche caldamente l'appello del Cassiere che invita i Soci al versamento delle quote per l'anno 1956-57, al più presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali è stato aperto il Conto Corrente Postale N°8/24094 intestato a: "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" "Associazione Italiana Ferrrovieri Esperantisti" Via Donato Creti, 61 Bologna - 131. Il Bollettino per il versamento nel Conto Corrente è stato allegato al precedente "Informa Bulteno" N°12-13 di Settembre Ottobre 1956 e pertanto i consoci che ancora non hanno rinnovato le quote sociali, possono mettersi in regola coi pagamenti usufruendo del citato Conto Corrente.

SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE

SOSTENETE L'I.F.E.A.

Si ricorda che le quote sono le seguenti:

- Associazione all'I.F.E.A. - all'I.F.E.F. - all'U.E.A. od alla F.E.I. con abbonamento alla rivista "L'Esperanto" £.1.050.=
- Associazione come sopra ma senza l'abbonamento alla rivista L'Esperanto £.750.=
- Associazione all'I.F.E.A. od all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di adesione alla F.E.I. od all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali) £.550.=

Ricordiamo ai nostri Soci il dovere di abbonarsi alla Rivista "L'Esperanto" organo della "Federazione Esperantista Italiana", il cui importo è di solo £.300 che possono essere rimesse alla nostra Associazione.

BONDEZIROJ

EN OKAZO DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO" FRATE DEZIRAS FELIĈAN KRISTMASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ ANOJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO EN ĈIUJ LANDOJ.

DEKJARA DATREVENO DE FONDIĜO DE U.N.E.S.C.O.

Ĝuste antaŭ dek jaroj, precize la 4-an de novembro 1946, dudok Ŝtatoj ratifis la konstitucian Akton de iu speciala internacia organizaĵo, kies tasko estis efektiviĝi la idealon de monda paco per internacia kunlaboro sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo. Tiu organizaĵo nomiĝis UNESCO, laŭ la mallongigo de la angla difino, nome Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Scienco, Edukado kaj Kulturo.

Estas inde por ni Esperantistoj feste memori la dekjaran datrevenon de ties fondiĝo, ne nur ĉar UNESCO REPRESENTAS unu el tiuj idealismaj, pacaj organismoj kies agado troviĝas tiom proksima al niaj sontoj kaj kies celoj kaj penadoj en internacia kampo tiom similas al niaj, sed ankaŭ ĉar ni mem, unuopaj Esperantistoj, kiel anoj de la tutmonda Esperanto Movado, estas efektive agantaj membroj de UNESCO. Fakte nia Universala Esperanto Asocio, post la Ĝenerala Konferenco de UNESCO okazinta en Montevideo en decembro 1954, troviĝas en konsultaj rilatoj kun UNESCO. Pliposte ni pritraktos la signifon de ĉi tiu pozicio, sed antaŭe permesu ke mi memoru al vi ion pri la strukturo, celoj kaj atingoj de UNESCO.

STRUKTURO - UNESCO konsistas el tri organoj; la Ĝenerala Konferenco, la Plenum-Komitato, kaj la Sekretariato.

La Ĝenerala Konferenco, kiu estas la supora organo, ampleksas la dolegitaron de la Ŝtatoj-membroj. Ĝia precipa tasko estas diskuti kaj decidi la laborprogramojn por la du jaroj sekvontaj la lastan kunsidon. Fakte la Ĝenerala Konferenco kolektiĝas ĉiun-duan jaron. En 1954 ĝi okazis en Montevideo kaj konis la triumfon de Esperanto pere de la streĉa agado de nia speciala sendito, prof-ro Ivo Lapenna. Ĉi tiun jaron, ĝuste en ĉi tiuj tagoj, la Ĝenerala Konferenco kunsidas en New Delhi; nia observanto estas S-ro Tibor Sekelj.

Ni estas informitaj ke Prof-ro Lapenna sendis al Ĝenerala Direktoro de Unesco ampleksan raporton pri la agado de nia Asocio en la lastaj du jaroj kaj tute speciale pri la helpo de U.E.A. al laboroj de UNESCO. Tion raporton la Ĝenerala Direktoro decidis cirkuligi al ĉiuj Ŝtatoj-membroj kaj al dolegitoj de la Unesco-konferenco. Ĉiu ajn povas mem taksu la apartan gravecon kaj valoron de tiu ĉi decido.

La aliaj du organoj - la Plenum-komitato kaj la Sekretariato - dependas de la Ĝenerala Konferenco kaj sekve de la Ŝtatoj-membroj. Konsekvence neniu organo de UNESCO povas en kiu ajn formo altrudi sian volon al la Ŝtatoj, kiuj ankaŭ sur tiu ĉi kampo de edukado, scienco kaj kulturo estas suverenaj. La Plenum-komitato, kies tasko evidentiĝas de la vorto mem, t.e. prizorgi la efektiviĝon de la programoj deciditaj de la Ĝenerala Konferenco, konsistas el 22 membroj kaj kunsidas almenaŭ dufoje en la jaro. La Sekretariato konsistas el la Ĝenerala Direktoro kaj el la necesa kelpantaro. Ĝia sidejo estas en Parizo kaj nuntempe laboras en ĝi 900 oficistoj.

CELOJ. - La du katastrofaj mondmilitoj kiuj horŝiris la tutan homaron en la daŭro de la sama generacio, vekis kaj naturigis la ideon ke la interpopola paco ne povas esti bazata nur sur politikaj interkonsentoj aŭ ekonomiaj traktatoj, sed ke ĝi ne estas atingebla sen intelekta kaj morala solidareco inter la diversaj nacioj, la etnikaj grupoj, la larĝaj popoltavoloj kaj, almenaŭ ĝis certa grado, eĉ inter la unuopaj homoj. De tia idealisma penso, de tia morala konvinko naskiĝis UNESCO, kaj tia idealisma kaj morala origino akiras specialan potencon signifi ĝuste hodiaŭ kiam, kun la subita terura malholiĝo en la ĉielo de la internaciaj rilatoj, montriĝas ke la du tradiciaj olivoj de la internaciaj antagonismoj (tiu de la ekonomiaj traktatoj kaj tiu de la politikaj aliancoj) troviĝas sub danĝero de nova bedaŭrinda fiasko.

Do, antaŭ dek jaroj, per la volo de 20 Ŝtatoj ratifiintaj la Konstitucian Akton, ekfunkciis tiu nova esperiga instrumento de interpopola paco. Poste aliĝis al ĝi multaj aliaj Ŝtatoj, tiel ke UNESCO hodiaŭ ampleksas 76 membrojn.

La solena enkonduko de la Konstitucia Akto doklaras ke "Dum la daŭro de la historio, reciproka nekompreniĝo inter la popoloj ĉiam estis en la originoj de la suspektoj kaj malkonfido inter la nacioj, kaj pro tia motivo la malkonkordo tre ofte degeneris en militon". Pliposte la Akto substrekas ke la homa digneco "postulas la disvastiĝon de la kulturo kaj edukado de ĉiuj homoj" kaj ke la paco "devas esti bazita sur la intelekta kaj morala solidareco de la homaro". Por tiaj motivoj la subskribintaj ŝtatoj "favorose la reciprokan interkompreniĝon kaj interkonigiĝon de la nacioj, donante sian helpon al diversaj organoj de anasa informado, antaŭigante la popolan edukadon kaj kontribuante al disvastiĝo de la kulturo".

ATINGOJ. - Estus neeble detale preparoli aŭ eĉ nur listigi la sennombrajn atingojn de UNESCO en la tre diversaj branĉoj de sia dokjara laboro. Mi nur mencias la Instituciojn kreitajn kun la celo forigi la analfabetismon, kiu ankoraŭ atingas la 55 % de la plenaguloj. Sur la kampo de naturaj Sciencoj UNESCO akcelas la internacian kooperadon inter la sciencistoj. Ĝi publikigis diversajn kolektojn de reproduktaĵoj de la plej famaj pentraĵoj en la mondo, prizorgis tradukojn el la araba, ĉina, hinda, itala, japana, persa kaj portugala lingvoj en aliaj pli diskonigitaj kun la celo oblige disvastiĝon de elstaraj majstraj verkoj ĝis nun ne sufiĉe konataj. UNESCO ORGANIZIS vojaĝantajn ekspoziciojn, eldonis plurajn periodaĵojn, inter kiuj ege menciindaj estas Unesco-Courier kaj Unesco-Cronicle, kaj iniciatis gravajn fakajn Konvenciojn (ekzemple la Universala Kopirajta Konvencio), kaj nun estas en preparo, aŭ oble jam preta, tre grava verko: la Kulturhistorio de la Homaro.

o o o o o o o o o

Kaj nun kelkaj vortoj pri la signifo de la fama Rezolucio favore al Esperanto, aprobita en Montevideo. Estas utile antaŭe relegi la tekston:

- "" La Ĝenerala Konferenco, post diskuto de la Raporto de la Ĝenerale Direktoro pri la internacia peticio favore al Esperanto,
- 1) notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la interpreksinigo de la popoloj;
 - 2) konstatas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO;
 - 3) konisias la Ĝeneralan Direktoron plue sekvi la spertojn, kiujn prezentas la utiligo de Esperanto por la edukado, la scienco kaj la kulturo, kaj tiu celo kunlabori kun la Universala Esperanto-Asocio en ĉiuj aferoj kiuj interesus ambaŭ organizaĵojn. ""

La graveco de tiu Rezolucio kuŝas en la fakto ke ĝi ne parolas pri la eventuala eblecoj por la estonteco, nek ĝi teoriumas pri la strukturo, kiun devus aŭ ne devus havi la Internacia Lingvo. La Rezolucio, tute simple, implicite konsideras Esperanton kiel socian faktan kaj rekogas ke la rezultoj jan atingitaj (ne atingotaj) per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj proksinigo de la popoloj, respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO. Ŝajnas al mi ke ĉi tiuj lastaj vortoj ontonas la ŝlosilon por korekte taksii la unikan valoron de la Rezolucio de Montevideo, per kiu estas por la unua fojo oficiale agnoskita la eduka, scienca kaj kultura valoro de la Internacia Lingvo. En tiu agnosko ĝuste konsistas ĝia historia epokfaranta signifo.

DK-RO LUIGI TADOLINI

LA 15-a DE DECEMBRO

Je tiu tago, la datreveno de la naskiĝtago de L.L.ZAMENHOF, iniciatinto de la lingvo Esperanto, la Esperantistoj ĉie en la mondo kutime pensas tute speciale pri la signifo de la Internacia Lingvo kaj la Internacilingva Movado.

Ni intencas memori la 15-a de decembro al ĉiuj esperantistoj, en tiu Zamenhof-tago ili pensas serioze pri sia afero, kaj pri la Hono, kiu per sia sindono kaj talento obligis la miraklon, kiun ili travivas.

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

3 - 10 aŭgusto 1957 - Marseille (Francujo)

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille (Francujo). Telefonoj: Prado 55-46; Ferréol 98-18. Telegrafo: Esperanto. Banko: James Rosa. Ĝirkonto: n-ro 156-15 G.E.

O F I C I A L A K O M U N I K O

n-ro 1 - 2

okt.-novem. 1956

POŝTKARTOJ: La koloraj kongresaj poŝtkartoj estas riceveblaj pere de la Landaj Asocioj aŭ de la Universala Kongreso. Prezo: 100 fr.fr. aŭ 4 respondkuponoj por 10-ekz.

GLUMARKOJ: La Landaj Asocioj aŭ la Universala Kongreso povas liveri la multkolorajn glumarkojn. Prezo: 100 fr.fr. aŭ 4 respondkuponoj por 2 folioj de po 25 markoj.

Kotizoj: Ĝis fino de decembro validas la jenaj kotizoj: kongresano 2.400 fr.fr. edz(in)o de kongresano 1.200 fr.fr. junul(in)o ne pli ol 20 jara kaj studentoj 800.

RABATOJ: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de U.E.A. (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 400 fr.fr. Edzino de Individua Membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj.

UNUA BULTENO: La okpaĝa Unua Oficiala Bulteno, kun listo de Perantoj, provizora programo kaj aliĝilo estas senpage ricevebla de la Landaj Asocioj aŭ de la adreso de la Universala Kongreso.

UNUA BULTENO: Ĝi aperos komenos de januaro. Por reklami en ĝi aŭ por kunsendi turismajn broŝurojn aŭ propagandilojn en Esperanto via turnu de la Universala Kongreso.

LOTERIO: Kiel anoncite, estas lotumitaj 36 premioj inter la unuaj mil kotizintaj kongresanoj. La unuaj tri premioj konsistas el stipendioj, respektive: 15.000, 7.000 kaj 3.000 fr.fr. Aliaj premioj konsistas el diversaj verkoj kaj abonoj.

ARTIKOLO: Lokaj esperantistaj societoj, aliĝintaj al la Landa Asocio, povas senpage mendi de la Kongreso artikolon pri Marseille por klubaj kunvenoj.

HOTELOJ: Provizoraj prezoj de hoteloj en Marseille: 1.a Kat.=1.000/3.500; 2.a Kat.=600/2.700; 3.a Kat.=500/1.970; 4.a Kat.=470/1000. Informoj pri komuna loĝejo kaj tendumejo aperos en venonta komuniko.

VIVKOSTO EN MARSEILLE: Aktualaj mezaj prezoj en Marseille: Vino: 50 fr.fr. por litro; viando: 500; fiŝoj: 300/500; karotoj: 30; tomatoj: 50; verdaj salatoj: 80; florbrasiko: 50; kukumetoj: 100; pizoj, fazeoloj: 120; artišokoj: 150 por kg. Piroj, pomoj vinberoj, kaŝtanoj: 100; bananoj: 200 por kg. Dunsomere multaj prezoj estas malplimultekostaj.

VIZITO: La Komerca Ĉambro de Marseille donacas al 800 kongresanoj senpagan persipanon viziton duhoran en la haveno de Marseille, la plej granda en la Mediteraneo.

ANTAŬKONGRESO: La Universala Kongreso kunlabore kun la Esperantista Federacio de Parizo organizas Oficialan Antaŭkongreson en Parizo de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957. La programo antaŭvidas altnivelajn prelegojn, vizitojn en la mondfama urbe kaj ekskursojn al ravaĵ vidindaĵoj. La Antaŭkongreso estas rezervita por aliĝintoj en la Universala Kongreso.

STATISTIKO: (ĝis la fino de oktobro) Aŭstrujo 3, Belgujo 4, Brazilo 3, Britujo 13, Bulgarujo 2, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 58, Germanujo 13, Hispanujo 3, Italujo 20, Jugoslavio 9, Japanujo 1, Maroko 2, Nederlando 10, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 2, Svedujo 16, Svisujo 10, Usono 1, Entute 186 el 27 landoj. (Paŝintjare 232 el 17 landoj).

Gian Carlo FIGHLERA Konstanta Kongresa Sekretario

FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO - KORESPONDA SERVO

ANONCO AL LA PERANTOJ DE LA LANDAJ ASOCIOJ DE I.F.E.F.

"Francaj gekolegoj deziras korespondi kun samideanoj en via lando. Bonvolu sendi ĉiujn proponojn al la adreso de la peranto:

LECLERCQ Lucien, 9 Allée Richelieu - SEVRAN Seine et Oise Francujo."

Bonvolu aperi tiun anoncon en via landa gazeto.

BOLONJA INTERNACIA FOIRO - ESPERANTO-MANIFESTACIO

La Esperanta Grupo "Achille Tellini" en Bologna estas invitata aranĝi Esperantan tuttagan manifestacion en la kadro de la Bolonja Internacia Foiro okazonta de la 8-an ĝis la 22-an de majo 1957.

Ni petas sendi, al tuta mondo, materialon por ekspozicio precipe rilate al la aplikado de Esperanto al industrio kaj komerco, specialaj temoj de la manifestacio, al "Gruppo Esperantista Via Rolandino, 4 - Bologna (Italujo); aŭ, precipe por la Fervojistista fako, al "Itala Fervojistista Esperanto-Asocio - Via Donato Creti, 61 Bologna (Italujo)".

Danke al Lia Mosto Adv-to Raffaele Bagmulo Honora Prezidanto de la Esperanta Grupo "A. Tellini" okazis samtempe ankaŭ "amikeca festo", en kiu oni disdonas "amikecaj donacoj" al la ĉeestantaj eksterlandanoj.

La fervojistoj estas petataj sendi la materialon rilate al la aplikado de Esperanto al industrio kaj komerco, precipe en fervojista kadro.

RADIO ROMA - ESPERANTO Casella Postale 320 ROMA (Italujo)

DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1956 - 1957

La elsendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) tri foje po semajno
Stacioj: m. 30,90=Mo/s. 9,71; m. 41,24=Mo/s. 7,27 kaj m. 50,34=Mo/s. 5,96
Prelegantoj: S-ro Luigi MINNOLA (MI) - Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA (MU)

D E C E M B R O - 1 9 5 6

- 682 mardon la 4-an - Monte Verdi: La kreinto de la muzika dramo (MI)
 - 683 merkredon la 5-an - Mondo esperantista (MI)
 - 684 vendredon la 7-an - Italaj komponistoj: Don Lorenzo Perosi (MU)
 - 685 mardon la 11-an - Italaj sanktejoj: Loreto (MU)
 - 686 merkredon la 12-an - Novaĵoj el Italujo (MI)
 - 687 vendredon la 14-an - La 97-a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof: kiel ni festu la du ventan jubileojn de Zamenhof (MU)
 - 688 mardon la 18-an - Panoramo de italaj urboj: "Perugia" (MI)
 - 689 merkredon la 19-an - Nia Gazeto (MI)
 - 690 vendredon la 21-an - Vintro (MU)
 - 691 mardon la 25-an - Tri solenoj tre intimaj kunligitaj: Kristnasko - Novjaro - Epifanio (MU)
 - 692 merkredon la 26-an - La Kristnaska bulko (rakonto) (MI)
 - 693 vendredon la 28-an - Letarkesto kaj bibliografio (MU)
- I A N U A R O - 1 9 5 7
- 694 mardon la 1-an - De la sojlo de la nova jaro (MI)
 - 695 merkredon la 2-an - Kuriero de Esperanto (MI)
 - 696 vendredon la 4-an - Kiel la Esperantistoj festas ĉiun kvaran de Januaro la tago de la Blinduloj (MU)
 - 697 mardon la 8-an - Januaro (MU)
 - 698 merkredon la 9-an - Kuriero de Esperanto (MI)
 - 699 vendredon la 11-an - Italaj bolartaj urboj: "Sulmona", okaze de la 2000-jara datreveno de la naskiĝo de la latina poeto Publius Ovidius Naso (MU)
 - 700 mardon la 15-an - Novaĵoj el Italujo (MI)
 - 701 merkredon la 16-an - Kuriero de Esperanto (MI)
 - 702 vendredon la 18-an - Letarkesto kaj bibliografio (MU)
 - 703 mardon la 22-an - La kanzonoj de la bonŝanco de la festivalo de Bari (MU)
 - 704 merkredon la 23-an - Kuriero de Esperanto (MI)
 - 705 vendredon la 25-an - Survoje al Damasko (konvertiĝo de Sankta Paŭlo) (MU)
 - 706 mardon la 29-an - Giusoppe Verdi, 156-a datreveno de la morto (MU)
 - 707 merkredon la 30-an - Kuriero de Esperanto (MI)

La fakestro: Blasimmo

GAZETTOJ RICEVITAJ (Estas indikitaj la plej laste numero ricevitaj)

- ESPERANTO - REVUO INTERNACIA = Oficiala organo de Universala Esperanta-Asocio
N-ro 612 (11) Novembro 1956 kaj N-ro 613 (12) Decembro 1956
- LA PRAKTIKO = Organo de la Universala Ligo N-ro 11 (229) Novembro 1956
- INFORMILO DE INTERNACIA ESPERANTO MUZEO EN WIEN N-ro 4 (24) Novembro 1956
- HEROLDO DE ESPERANTO = N-ro 14 (1238) 1 Oktobro 1956
- OOMOTO = Oficiala organo de Oomoto kaj U.H.A. N-ro 187-188 Januaro-Februaro 1956
- GERMANA ESPERANTO-REVUO = Oficiala organo de la Germana Esperanto-Asocio
N-ro 11 Novembro 1956
- AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO = Oficiala organo de la Aŭstria Esperanto-Movado
N-roj 12-11 Novembro-Decembro 1956
- ARGENTINA ESPERANTISTO = Organo de la Liga Argentina de Esperanto N-roj 309-310
Septembro-Oktobro 1956
- VEGETARANO = Organo de T.E.V.A. Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio N-ro 3
Vintro 1956
- LA MIGRANTO = Oficiala ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj N-ro 8 Julio 1956
- LA FILATELISTO = Ligilo inter la Esperantistaj Filatelistoj N-ro 38 sept-okt. 1956
- THE WORKER ESPERANTIST = Oficiala organo de la Workers' Esperanto Movement
N-ro 91 Decembro 1956
- BULTENO de Bulgara Esperanto Asocio kaj de Bulgara Esperanto Kooperativo
N-ro 4-5 Septembro - Oktobro 1955
- LA SEPSTELA URBO = Bulteno de Madrida Esperanto-Klubo N-ro 1+2 (13-14)
Januaro-Februaro 1956
- BULTENO de la Internacia Federacio Esperantista Fervojista N-ro 1 Oktobro 1956
- BULTENO de la Germana Esperanta Fervojista Asocio N-ro 5 Septembro-Oktobro 1956
- LA FERVOJISTO = Esperanto-Bulteno de Franca Fervojista Esperanto-Asocio
N-ro 117 Novembro 1956
- FERVOJISTO = Oficiala organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda
N-ro Septembro 1956
- JUGOSLAVIA FERVOJISTO = Organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj
N-ro 8 Novembro 1956
- BULTENO = de la Aŭstria Sekcio de "I.F.E.F." N-ro 3 Novembro 1956
- I. ESPERANTO = Organo Ufficiale della Federazione Esperantista Italiana Nuova Serie
N-ro 42 - N-ro 5 Settembre-Ottobre 1956
- PACO = Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (M.E.M.) Itala Eldono
N-ro 27 Februaro 1956
- PACO = Oficiala organo de M.E.M. Bulgara Eldono N-ro 28 Marto 1956
- PACO = " " " " Ĉeĥoslovaka Eldono N-ro 29-30 Aprilo-Majo 1956
- PACO = " " " " Japanujo N-ro 31 Junio 1956
- PACO = " " " " Hungara Eldono N-ro 33 Aŭgusto 1956
- INFORMA BULTENO del Gruppo Esperantista Bolognese "A. Tellini" Bologna Ottobre 1956
- BOLLETTINO DI INFORMAZIONE AI SOCI del Gruppo Esperantista Milanese N-ro 12/72
Dicembre 1956
- LA "V.E.K.O." = Organo de la Vares-Provinciaj Esperantistaj Klubo en Varese
N-ro 3 Maggio 1956
- PROGRAMO DE LA DISSENDOJ EN ESPERANTO de Radio Roma-Esperanto Decembro 1956
Januaro 1957
- INTERSTENO = Eldonas Tutmonda Intersteno-Asocio: G. Daglio N-ro 2 Julio 1956
- ESPERANTISTA GRUPO ESPERIA - COMO = Bollettino di informazione ai Soci Ottob. 1956